

LABORRAPORTO DE LA ESTRARO DE MEKSIKA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ RAPORTO PRI ESPERANTO EN MEKSIKO JANUARO – DECEMBRO 2010¹

ENKONDUKO

Tiu ĉi dokumento estas la laborraporto de la MEF-estraro, ĝi enhavas kion nia teamo² celis, faris kaj atingis en 2010, sed en ĝi ankaŭ troviĝas informoj pri diversaj agadoj de la ĝenerala publiko kaj de pluraj aliaj esperantistoj. Tial, per tiu ĉi verko oni havos ĝeneralan superrigardon pri la meksika Esperanto-movado dum 2010.

Kiel referenco ni prenis la laborplanon de MEF (2008-2012), en kiu la ĉefaj laborkampoj estas; informado, instruado / klerigado kaj utiligado.

1. INFORMADO

La informa agado estis plenumita je diversaj kampoj kiel la retpaĝo, ekspozicioj, standoj / flugfolioj, afiŝoj, informprelegoj, gazetaro, radio kaj televido.

A) Retpaĝo

Atenti pri la konstanta kontrolo de la retpaĝo estis fundamenta por ni. Ĝis nun ĝi estas la plej efika amasinformilo kaj por la ĝenerala publiko kaj por la esperantistaro (Bildo 1).

Dum la tuta jaro preskaŭ senĉese ĝi bone funkciis kaj, krom la jam konataj menueroj, aperis aliaj sekcioj;

* HISPANE

- **“Esperanto en los medios nacionales”**. En kiu la vizitantoj povas legi novaĵojn hispane pri Esperanto ĉefe en naciaj aŭ regionaj ĵurnaloj kaj revuoj eldonitaj en Meksiko. Kelkaj verkistoj de la artikoloj estis esperantistoj sed ankaŭ aliaj ĵurnalistoj, kiuj interesiĝis pri la temo.
- Por 2010, en la hispana parto **“¿Cómo aprender...?”** ni decidis disigi la menueron “Cursos” –kursoj– en: 1) cursos presenciales –ĉeestantaj– kaj 2) cursos por internet –retaj–, ĉar antaŭe estis komplika trovi tiujn lastajn pro la daŭra publikigo de ĉeestantaj

¹ Tiu ĉi dokumento estis verkita de Mallely Martínez Mateos, prezidantino de Meksika Esperanto Federacio, kontrolita kaj aprobata de la sekvaj MEF-estraranoj: Daniel Moreno Martínez, ĝenerala sekretario, Morayma Martínez Mateos, kasistino, David López Rueda, membro.

² Ni nomas “teamo” ne nur al kvinopuloj, kiuj gvidas la asocion sed al la tuta membraro, kiu diversmaniere apogis la laboron en la meksika Esperanta movado.

kursoj. Ĉefe ĉar nuntempe la plej multaj lernas Esperanton virtuale, pro tio gravas ke la retaj kursoj estu facile troveblaj.

* ESPERANTE

- **“Helpiloj por universitataj E-lernantoj”**. Post la komenciĝo de la oficialaj kursoj en la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC), venis la ideo plifaciligi la trovadon de taŭga materialo aŭ konsiloj por tiaj lernantoj. Tamen la enhavo estas utila por ĉiu persono, kiu volas profundigi siajn konojn kaj tiu spaco estas utila por ĉiu ajn intereso.
- **“NI ĈIUJ” (Revuo de MEF)**. Unu el la avantaĝoj esti MEF-membro, estas ricevi, elektronike, la semestran bultenon de la asocio, tamen ni decidis iom post iom publikigi la antaŭajn numerojn por kundividi la informon ankaŭ kun aliaj esperantistoj.



Bildo 1. Esperanta versio de la retpaĝo de MEF 2010, “Kursoj”

Daŭre kontribuis en la teknika prizorgado de la retpaĝo la MEF-membroj; Boris Legault, Martin Schäffer kaj Raúl Angüiano. La prezidantino de MEF, Mallely Martínez Mateos, ĉefe atentis pri la verkado kaj publikado de artikoloj kaj novaĵoj, krome kontribuis per artikoloj la estraranoj; Morayma Martínez, David López kaj Daniel Moreno, tiel kiel la daŭra helpanto de la asocio Martin Schäffer. Aliaj helpantoj en la verkado de la paĝo dum 2010 estis; Anneleen Nys, Gilda Muñoz, Víctor Sombra kaj la gvidantoj de la klubo en GDL, Ulises Franco, Sara González kaj Edgar López.

En la retpaĝo aperis dum 2009 listo de lokaj kontaktoj de 26 meksikaj urboj, kiu donas al interesitoj, naciaj kaj eksterlandaj esperantistoj ŝancon kontakti aliajn E-lokulojn, dum 2010 la

kvanto restis sama. Do, ni invitas partopreni esperantistojn en tiu parto de la projekto helpante nin atingi novan kvanton kaj estante en pli multaj meksikaj urboj kiel eble.

Laŭ rapida kalkulo, venis plej da informpetoj en 2010 al la sekvaj urboj: ĉefurbo de Meksiko, Guadalajara, Monterrey kaj Puebla. Ankaŭ ĉe la MEFa retpaĝo eblas registriĝi, tiel ni povas havi retadreson de interesitoj por poste kontakti ilin. La unua mesaĝo sendita al la registrantoj estis por oferti helpon kaj demandi de kiu urbo ili estas, kiel ili eksciis pri Esperanto kaj ĉu ili lernas per iu specifa kurso. Ne ĉiuj homoj respondis, tamen aliaj ja tion faris kaj poste kelkaj eniris la movadon partoprenante en renkontiĝoj aŭ kiel loka kontakto.

En “vizitu Meksikon / turismo” dum 2009 aperis, hispane kaj esperante, informoj de tri urboj: Guanajuato, San Luis Potosí kaj Oaxaca kaj en 2010 jam troviĝis tie aliaj tri: ĉefurbo de Meksiko, Guadalajara kaj Tula (**Tabulo 1**). Cetere la celo informi pri ili en la nacia lingvo helpis informi ne esperantistojn pri la internacia lingvo ĉar, serĉante “allogajn turismajn lokojn”, oni alvenis hazarde al nia retpaĝo.

Tabulo 1. Eroj de turismaj informoj publikitaj en la MEF-retpaĝo dum 2010.

 Esperanto	 Español
Ĉefurbo de Meksiko – Historia Urbocentro Ĉi tie troviĝas la unua stratkadro de la ĉefurbo de Meksiko. Ĝi estas la plej malnova parto de la urbo enhavanta pli ol 400 konstruaĵojn...	Ciudad de México – Centro Histórico Aquí se encuentra el primer cuadro de la Ciudad de México. Es la parte más antigua de la Ciudad, cuenta con más de mil 400 edificios...
Guadalajara - Blazona Placo Ĝi estas bela placo kiu havas kioskon, donaco de la Generalo Porfirio Díaz en 1909. Ĝi estis akirita en la fabriko “Fondereis D’Art Du Val Dasne” de la urbo de Parizo...	Guadalajara: Plaza de Armas Hermosa plaza que cuenta con un Kiosko, regalo del General Porfirio Díaz en 1909; fue adquirido en la fábrica “Fondereis D’Art Du Val Dasne” de la ciudad de Paris...
Tula En Tula Hidalgo (idalgo) troviĝas la plej grava arkeologia zono de la tolteka kulturo, la ruinoj de la Granda Urbo de “Tollan”, ĝi estis je sia plej granda apogeo inter la jaroj 900 kaj 1050 p. K...	Tula En Tula Hidalgo se encuentra la Zona Arqueológica más importante de la Cultura Tolteca, las ruinas de la Gran Ciudad de “Tollan”, que vivió su máximo esplendor entre los años 900 y 1050 d. C...

B) Informagadoj: ekspozicioj, standoj / flugfolioj, afiŝoj

En 2010 okazis diversaj informagadoj en la lando: kiel ĉefa informilo por la ĝenerala publiko ni uzis la jam konatan multkoloran flugfolion (bildo 2) sed ankaŭ ni disdonis pliajn printaĵojn kun pli seriozaj informoj pri la avantaĝoj kaj reala uzo de Esperanto, kiel ekzemple “An Update on Esperanto”, “The Universal Esperanto Association is in official relations with UNESCO” eldonitaj

de UEA, “ALTE-Affiliates”, en kiu aperas UEA kiel rajtigita organizo por ekzameni homojn laŭ la



Komuna Eŭropa Referenckadro, prenita de la reto. Informoj en la hispana estis la teksto: “Generalidades sobre el Idioma Internacional Esperanto”, verkita de Mallely Martínez M. Tiuj lastaj dokumentoj estis ĉefe por institucioj, instruistoj, estroj de edukaj institucioj kaj universitatanoj.

En majo la estraranoj Mallely Martínez M. kaj Daniel Moreno M. havis paroladon kun membroj de la Internacia Konsilio de la Monda

Socia Forumo por informi al ili pri la pluraj avantaĝoj de Esperanto, ni proponis ke la internacia lingvo estu uzata kiel laborlingvo en MSF, ĝis nun tio ne okazis, tamen ili akceptis ke la monataj bultenoj estu publikitaj en Esperanto. Tiel ĝiaj aŭgusta, oktobra, novembro kaj decembra bultenoj de 2010 estis tradukitaj al Esperanto kaj publikitaj en la retpaĝo de la SMF kaj en tiu de “Ciranda Internacional”, organizo kiu kovras informadon de la SMF (Bildo 3). La traduka laboro estis farita de la MEF-estraranoj David López Rueda, Mallely kaj Morayma Martínez Mateos, tiel kiel de Martin Schäffer.



Bildo 3. Retpaĝo de Ciranda Internacional kun informoj en Esperanto pri la Monda Socia Forumo.

La 12an kaj 13an de novembro 2010 Meksika Esperanto-Federacio partoprenis en la "4a Internacia Kongreso pri la Instruado de Fremda Lingvo kaj Kulturo" en la Aŭtonoma Universitato de San Luis Potosí (UASLP).

La federacion reprezentis Mallely Martínez M., Morayma Martínez M., David López R. kaj Martin Schäffer, kiuj dum pli ol 15 horoj havis informstandon kun riĉa elekto de originala kaj tradukita literaturo (Foto 1), kiel ekzemple "Sanga Nupto" de Federico García Lorca, "Sonetoj" de Shakespeare, "Lingvo kaj Menso" de Noam Chomsky, "Tra l' okuloj del venkitoj" de Miguel



Foto 1. Informstando en Lingva Kongreso de la UASLP.

León Portilla (La visión de los vencidos; fame kontata libro en Meksiko), "Ĉirkaŭ la mondo en 80 tagoj" de Jules Verne kaj "La infana raso" de William Auld. Diversaj altkvalitaj informfolioj en la angla kaj hispana informis pri la diversaj aspektoj de la lingvo. Pro varbafiŝo sur tripieda haltilo la partoprenantoj jam de malproksime vidis la standon.

Por la dua fojo, ni partoprenis aktive en alia universitata evento, inter la 24a kaj la 26a de novembro en la urbo Querétaro okazis la akademie altkvalita XXIVa Forumo de Universitataj Specialistoj pri Fremdaj Lingvoj (FEULE en la hispana), ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 300 fakuloj, inter tiuj, profesoroj de lingvaj fakultatoj de diversaj meksikaj universitatoj. La evento estis organizita de la



Foto 2. Informstando dum XXIVa FEULE en la Universitato Aŭtonoma de Querétaro.

Lingva Fakultato de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ), kie ekde marto 2010 oni lernas Esperanton en liberaj kursoj. Meksika Esperanto Federacio havis la okazon fari standon (Foto 2), kiu estis vizitata de dekoj da studentoj kaj fakuloj. La informstando estis zorgita ĉefe de Zyanya O'Neill P., Sergio Romero A., Mallely Martínez M., Martin Schäffer kaj Carlos Hernández L.

Aliflanke, dum la lasta semajno de novembro, en kultura centro de la ĉefurbo de Meksiko nomata "Centro Cultural Futurama" okazis ekspozicio pri pentrado, en kiu José Cruz Pacheco montris, krom diversajn pentraĵojn, kelkajn el siaj desegnaĵoj faritaj por nia bulteno "Ni Ĉiuj", tiel la vizitantoj povis rigardi tiujn bildojn (Foto 3) kaj aŭtomate estis disvastigo de la "internacia lingvo" ĉar skribe estis



Foto 3. Vizitanto rigardante bildojn de "NI ĈIUJ"

informoj pri kio estas ESPERANTO, krome la estroj de la galerio permesis al ni lasi ĉe la bildoj kelkajn flugfoliojn.

C. Informprelegoj

Luis Córdova Arellano kune kun kelkaj estraranoj kaj helpantoj de MEF dufoje aranĝis informprelegon pri Esperanto kun la celo inviti homojn al la kursoj en la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko en ĝia Jura Fakultato. Multaj studentoj vizitis la prelegojn.

Per aranĝo de mefano José Luis Molina, Mallely Martínez kaj Martin Schäffer, estis prelego en UPN-Mexicali (Universitato Pedagogia Nacia), en kiuj ĉeestis pluraj instruistoj kaj studentoj de tiu kaj aliaj ŝtataj universitatoj. Ni tiam informis ilin ke Esperanto estas instruata en la Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California.



Foto 4. David López prelegante.

Meze kaj fine de novembro ni prelegis dum universitataj eventoj en du provincoj de Meksiko, kie ni ankaŭ havis informstandon. David López Rueda prelegis (Foto 4) antaŭ publiko de ĉirkaŭ 30 personoj en kongreso organizata de la Universitato Aŭtonoma de San Luis Potosí kaj en la Aŭtonoma de Querétaro, Martin Schäffer kaj Mallely Martínez prelegis antaŭ 46 personoj. La temo estis la sama en ambaŭ lokoj: "Esperanto: komunikado kaj interkultureco". En tiu ĉi lasta kazo bone estis ke en la programo de la forumo, la prelego pri Esperanto aperis kune kun mallongaj informoj pri la lingvo kaj pri la celoj de Meksika Esperanto Federacio.

D. Gazetaro

Interne, MEF eldonis en 2010 nur 1 numeron de sia bulteno "NI ĈIUJ", tio pro la troa laboro pri kio ni okupiĝis, ĉefe en la disvastigo de Esperanto en universitatoj kaj amaskomunikiloj. La ĉefa temo de "NI ĈIUJ" 1-2010 estis: *"La instruado de Esperanto: inda sperto persone, profesie kaj movade"*, en tiu numero kontribuis enhave: Daniel Moreno M., Morayma Martínez M., Ulises Franco P., Juan J. Schmitter S. kaj Pascal Bergeot.

Rilate al la ekstera gazetara informado estis almenaŭ 9 publikaĵoj, ĉiuj estas en la hispana kaj kelkaj uzis iom da Esperanto. Inter la artikoltitoloj estas:

1. Educación y Esperanto / Edukado kaj Esperanto, de José Daniel Guerrero.
2. Expertos de 60 países participan en Congreso de Esperanto en Cuba / Spertuloj de 60 landoj partoprenas Esperantan Kongreson en Kubo.

3. Universidad de BC., primera en impartir clases de Esperanto en México / Universitato de BC. estas la unua, kiu instruas Esperanton en Meksiko.
4. Alia mondo eblas. El Foro Social Mundial (FSM) habla en Esperanto / Alia mondo eblas. La Monda Socia Forumo (MSF) parolas en Esperanto.

Kelkaj publikitaj artikoloj ankoraŭ troviĝas rete. Por trovi la ligojn de tiuj publikitaj en 2010, vi povas iri al la menuero “Esperanto en los medios nacionales” de la retpaĝo de MEF, jen la rekta ligo <http://www.esperanto-mexico.org/es/node/455>

E. Radio / Televido

* En Guadalajara, Jalisco, Sara González Álvarez kaj eksterlanda vizitinto Frank Montenegro estis intervjuitaj la 9an de aŭgusto en radio-programo nomata “A las 9 con usted”, ĝi daŭris proks. 15 minutoj. La intervjuisto, Yolanda Zamora, faris kelkajn demandojn pri la Internacia Lingvo, kiuj estis prave responditaj de niaj kunlaborantoj.

* Dum vizito de Mallely Martínez kaj Martin Schäffer al UPN-Mexicali (Universitato Pedagogia



Foto 5. Intervjuante la esperantistojn en UPN.

Nacia), profesoro Carlos Flores Reyes el televida programo “*La Buena Educación*” intervjuis ilin (Foto 5) la 7an de oktobro pri la Internacia Lingvo Esperanto, tiu programo estas elsendita en la meksikaj urboj de la provinco de Baja California: Mexicali, El Valle de Mexicali kaj San Felipe, de la provinco Sonora: San Luis Río Colorado, Sonoita kaj Puerto Peñasco kaj en la usonaj urboj: sude de

California kaj de Arizona, kie miloj da aŭskultantoj tiam certe eksciis pri Esperanto per ĝi, bone estas ke tiu amasa disvastigo helpis diskonigi ke eblas jam lerni Esperanton en la Universitato Aŭtonoma de Baja California, en ĝia fakultato pri Lingvoj.

* La 16an de novembro en la radioprogramo “Circo, maroma y radio” de la Universitato Aŭtonoma de San Luis Potosí, oni havis babiladon kun la MEF-estrarano David López Rueda. Dum ĝi David respondis demandojn, kiuj rilatis al la strukturo de la lingvo, la ideologio kaj al ĝia nuna uzado. Loĝantoj de tiu urbo povis per la frekvenco 88.5 FM kaj 1190 AM ekscii pri Esperanto kaj komenci kurson kun klubanoj de la Esperantista Potosina Klubo.

* Je la fino de la jaro, la raportisto Hugo Vela de nacia kaj konata televidprogramo “Proyecto 40” (Bildo 4) intervjuis al Mallely Martínez, Luis Córdova kaj Martin Schäffer. La intereso de Vela vekigis kiam li demandis sin: kiu estas la plej facila lingvo por lerni? La respondo trovis li en la

reto kaj ĝi estis “ESPERANTO”, ankoraŭ pli interesa por li estis ke ĝi bone funkcias kaj ke ĝi estas internacia. Post pli da esplorado, li kontaktis nin pere de la retpaĝo de MEF kaj petis rendevuon. Profesie kaj prave, la raportisto starigis plurajn interesajn demandojn kiuj iras ekde la kreado de la lingvo, ĝia historio, la nuna ŝtato de la nacia kaj internacia movado, avantaĝoj, kiel kaj kie lerni ĝin, inter multaj aliaj.

Surprizo estis ke Hannia Novell, estrino de la programo, kaj Hugo Vela klopodis prezenti parton de la novaĵo en Esperanto kaj verdire, ili tre bone faris. Je la sekva ligo vi povos vidi la kompletan elsendaĵon



Bildo 4. Raportisto Hugo Vela parolante en kaj pri Esperanto.

<http://www.youtube.com/watch?v=WXc9enFewc/> La elsendo okazis la 21an de decembro, post tio venis pluraj informpetoj kaj estis kelkaj kiuj eksciis pri la “verda lingvo” kaj esperantiĝis.

2. INSTRUADO / KLERIGADO

A) Ĉeestantaj kursoj

Inter januaro kaj decembro 2010 ni ricevis informojn pri 19 ĉeestantaj kursoj (Tabulo 2), entute 167 gelernantoj. La plej gravaj pro ĝia oficialeco estis la donitaj en la fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California (UABC), en Mexicali kaj Tijuana, tamen estis grava paŝo la iniciato de Sergio Romero Aldana, kiu kune kun siaj gelernantoj komencis instrui per liberaj kursoj en la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ). Tio donis al ni la eblon proponi al direktorino de la Fakultato pri Lingvoj de la UAQ oficialigi la E-kursojn, projekto pri kiu nun nia teamo okupiĝas.

Ni ne forgesu la gravecon de la ĉeestantaj kursoj, kiujn oni ofertis en la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko en ĝiaj Jura kaj Kemia Fakultatoj kaj kompreneble ankaŭ la klopodo de ĉiu instruisto, kiu helpas fari novajn esperantistojn en diversaj lokoj, institucioj kaj urboj.

Tabulo 2. Ĉeestantaj kursoj de Esperanto dum 2010 en Meksiko.

#	Dato	Instituto / Instruloko	Urbo	Nivelo	Instruist(in)o
1	Januaro	Ĥemia Fakultato de la Universitato Nacia Aŭtonoma de Meksiko (UNAM)	Ĉefurbo	Komencantoj	Daniel Moreno
2	Jan - dec	Vartejo Cuauhtémoc	Guadalajara	Komencantoj	Edgar López, Ulises Franco, Sara González
3	Jan - dec	Vartejo Cuauhtémoc	Guadalajara	Komencintoj	Edgar López, Ulises Franco, Sara González
4	Jan – dec	“Asociación de Jubilados y Pensionados del Poder Judicial Federal, A.C.”	Ĉefurbo	Komencantoj - Komencintoj	Sofia Carbot
5	Feb - maj	Suboficejo de MEF	Tecámac	Komencantoj	Morayma Martínez M.
6	Feb - maj	Suboficejo de MEF (por infanoj)	Tecámac	Komencantoj	Mallely Martínez M.
7	Mar - jun	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ).	Querétaro	Komencantoj	Sergio Romero A.
8	Jul - aŭg	Fakultato pri lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California.	Mexicali	Komencantoj	Gilda Muñoz B.
9	Aŭg - dec	Fakultato pri lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California.	Tijuana	Komencantoj	Gilda Muñoz B.
10	Aŭg - dec	Fakultato pri lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Baja California.	Tijuana	Komencantoj	Gilda Muñoz B.
11	Sept	La Casona	Puebla	Komencantoj	Anneleen Nys
12	Sept - okt	Jura Fakultato de la UNAM.	Ĉefurbo	Komencantoj	Luis Córdova Arellano
13	Sep - dec	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ).	Querétaro	Komencintoj	Sergio Romero Aldana
14	Sep - dec	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ).	Querétaro	Komencantoj	Zyanya M. O’Neill P.
15	sep - dec	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ).	Querétaro	Komencantoj	Carlos Hernández Loarca.
16	Okt.	Centro de Difusión Universitario Intercultural	San Cristobal de las Casas, Chiapas	Komencantoj	Anneleen Nys
17	Okt – dek	Vartejo Cuauhtémoc	Guadalajara	Komencantoj	Edgar López, Ulises Franco, Sara González
18	Okt – dek	Suboficejo de MEF	Tecámac	Komencintoj	Morayma kaj Mallely Martínez Mateos
19	Nov	Fakultato pri Lingvoj de la Universitato Aŭtonoma de Querétaro (UAQ) dum lingva kongreso nomata “FEULE”	Querétaro	Komencantoj	Martin Schäffer kaj Segio Romero

B) Retaj kursoj

Rilate al la interretaj kursoj, kiel en diversaj partoj de la mondo, en Meksiko estas relative granda kvanto da personoj, kiuj lernas Esperanton tiele. Laŭ registroj kaj informoj de retaj instruistoj-gvidantoj, dum 2010 estis 592 meksikanoj kiuj sekvis retajn kursojn, inter ili troviĝas:



a) Lernu.net: en kiu ĉefe Martin Schäffer bonvenigas la novajn registritojn per retmesaĝo kaj ofertas helpon en la instruado.



b) Livemocha: en kiu ekzistas la eblo ke aliaj esperanto-parolantoj korektu la ekzercojn de la lernantoj.



c) Kurso de Esperanto; daŭre Enrique ElleMBERG, Mallely Martínez kaj Morayma Martínez agis kiel instruisto-gvidantoj de tiu kurso.



ĉ) Esperanto en 10 lecciones; estas la kurso de meksika esperantisto Alejandro Mejia, li ofertas helpon en sia repaĝo kaj respondas dubojn kaj komentojn.

Vidante tiun kvanton oni tamen konsideru ke kelkfoje homoj, kiuj komencis lerni Esperanton en iu ĉeestanta kurso poste ankaŭ registriĝis ĉe Lernu aŭ aliaj. Samtempe oni atentu ke aliaj homoj lernis per retkursoj sed ne kontaktis mentoron, speciale ĉe la brazila kurso “Kurso de Esperanto” kaj ĉe “Esperanto en 10 lecciones”; kelkaj aliaj lernis nur per printitaj lernolibroj aŭ vizitis aliajn retkursojn, kiuj ne ofertas la eblecon havi mentoron nek registriĝon.

3. UTILIGADO

Renkontiĝoj en diversaj partoj de la lando estis malregulaj; Mexicali, Tijuana, Querétaro, Puebla, ĉefurbo de Meksiko, Tecamac, Monterrey, Guadalajara, Chihuahua, Durango, San Luis Potosí. Gravas memori bonan organizon kaj entuziasmon de homoj de la E-klubo de Guadalajara, dum 2010 ili okazigis 18 semajnajjn renkontiĝojn, indas menciigi ke tiu klubo organizas, kaj septembre 2011 gastigos, la 11an Meksikan Esperanton Kongreson en sia urbo. Parolante pri naciaj kongresoj, en 2010 ni ne okazigis ĝin ĉar ni okupiĝis pri la disvastigo kaj instigo al partopreno de homoj en eventoj okazintaj lastsomere en Kubo, tiel en la kvar tieaj internaciaj eventoj³ ĉeestis rimarkinda kvanto da meksikaj esperantoparolantoj:

1) Dum la 43a ILEI-Konferenco, okazinta inter la 11a kaj la 17a de julio, estis samtempe “Seminario por aktivuloj” en Matanzas en kiu partoprenis entute 22 homoj, 10 el ili estas meksikanoj kaj la aliaj ĉefe de



Foto 6. Konferencanoj kaj seminarianoj ĝuante la distran programon de la 43a ILEI Konferenco.

³ Por verki tiun tekston Mallely Martínez M., prenis informojn el la raportoj de la meksikanoj, kiuj ĉeestis la eventojn. El la 43a ILEI-Konferenco / Seminario por aktivuloj, ŝi prenis informojn verkitaj de Edith Ibariáz Q., Gilda Muñoz B. kaj Víctor Sombra A. El la 95a UK de Edgar López B., Sara González A. kaj Ulises Franco P. El la 41a IIK de Conny García C. kaj Llovana Martínez M. El la 66a IJK de David López R. kaj Gabriel Jiménez.

amerikaj landoj: Argentino, Bolivio, Brazilo, Dominika Respubliko, Haitio, Kanado, Nikaragvo kaj Urugvajo. El Eŭropo partoprenis reprezentantoj de Belgio kaj Polando.

Danke al la organizado kaj preparado de la ĉefaj seminarigvidantoj, Martin Schäffer kaj Radojica Petrović, la seminarianoj povis lerni pri diversaj aspektoj: disvastigaj, gramatikaj, lingvistikaj, didaktikaj metodoj por instrui, ekzistado de bona materialo por aktivuloj kaj instruistoj, ktp. Kompreneble la seminarianoj havis la eblon konatiĝi kun la konferencanoj (Foto 6) kaj tiel ĝui multajn momentojn kune. La temo de la konferenco “Edukado por kultura proksimiĝo” estis tute adekvata al la agoj kaj rezultoj de la evento.

2) *La 41a Internacia Infana-Junula Kongreseto* en Havano, de la 17a ĝis la 24a de julio.

Pli ol 20% de la etuloj en la 41a IJK estis el Meksiko, preskaŭ ĉiuj aktive partoprenis en la kultura programo dancante meksikan folkloron kaj elmontrante aktivecojn de la korea batalarto nomata “Tang Soo Do” (Fotoj 7-8). Krome, du plenkreskaj meksikaninoj partoprenis kiel helpantoj aranĝante interesajn aktivecojn por la etaj verduloj. 6 el la 8



Foto 7. La etaj artistoj kun Bert Schumman, la ĉefa organizanto de la 41a IJK.

meksikaj kongresinfanoj estis gelernantoj de la prezidantino de MEF, Mallely Martínez, ŝi konsideras ke la instruado al infanoj ne estas tiom facila, tamen, post la kontentiga rezulto kaj komentoj de la infanoj, ŝi daŭre pensas fari tian taskon. Unu el la plej kortuŝaj diraĵoj de la etuloj post la partopeno en IJK estis: “Post mia vizito al la kongreso en Kubo, mi sentas ke ne estas limoj, ke mi povas atingi ĉiun ajn celon, kiun mi havas”



Foto 8. Post dancado.

3) *La 95a Universala Kongreso de Esperanto*, okazinta en Havano inter la 17a kaj la 24a de julio. Nome de la lando, Luis Córdova Arellano salutis la kongresanaron, la fina nombro de partoprenantoj restis en 1002 el 59 landoj. De Meksiko partoprenis 36 homoj je diversaj aĝoj, kelkaj el ili aktive partoprenis en la UK programo, ekz. zorgante la budon de Meksika Esperanto Federacio dum la “Movada foiro” en kiu ni povis prezenti antaŭ la kongresanoj parton de nia E-agado (Foto 9). Aliflanke en la programero “Prelegoj pri Mez-Ameriko”, David López R. kaj Gilda Muñoz B. prelegis pri “Indiĝenaj lingvoj de San Luis Potosí” kaj pri “Meksiko, nuntempa kulturriĉeco laŭ la nordokcidenta landlimo”, respektive. Ambaŭ prezentoj estis tre interesaj kaj per ili la ĉeestantaro ja konas iom pli pri nia lando kaj kulturo.

En la kultura programo, Víctor Sombra A. partoprenis en la Oratora konkurso, en la internacia arta vespero Llovana, Mallely kaj Morayma Martínez Mateos kune kun Conny García kaj Gabriel Jiménez vige dancis folkloron, vi povas spekti la dancaĵojn prezentitajn ĉe <http://www.youtube.com/watch?v=53QapL74x2Q>. Kaj kion diri pri niaj meksikaj infanoj? Je la fermo, la 24an de julio, estis tre interesa partopreno de infanoj kaj junuloj el diversaj landoj, kiuj prezentis gajajn kantojn en Esperanto.



Foto 9. Meksika budo dum Movada Foiro, 95a UK.

4) 66a Internacia Junulara Kongreso en Sta. Cruz del Norte, Kubo, de la 24a ĝis la 31a de julio.

Tiu ĉi estis la lasta de 4 eventoj internaciaj okazintaj en 2010 en Kubo, en ĝi partoprenis 19 el la 36 meksikaj Uk-anoj sed, je nia surprizo, ni renkontis tie aliajn 8 samlandanojn, anoj de la familio Nájera, kiuj en 1980 organizis la 37an IJK en Oaxtepec, Meksiko. Grava evento en la historio de IJK ĉar tiam naskiĝis la IJK-flago (Bildo 5), uzata en preskaŭ ĉiuj postaj IJK por memori ĝian ĉeeston en la diversaj landoj, en kiu okazis tiu ŝatata evento kaj, de pluraj, la plej atendata kongreso en Esperantujo.



Foto 10. Meksikanoj dum 66a IJK.

En la 66a IJK, la meksikano montris denove meksikajn dancojn, nun de la ŝtato de Veracruz kaj denove la infanoj dancis folkloron de Sinaloa. Interesa por la partoprenantoj estis gustumi, dum internacia foiro, meksikajn tradiciajn dolĉaĵojn, tekilon kaj ankaŭ la akregan verdan kapsikon (Foto 10) nomata hispane “chile de árbol”. Certe pluraj ne plu ripetos la agon, ĉefe la kuraĝaj junaj eŭropanoj, kiuj tute ruĝiĝis post mordeto de unu el niaj plej tradiciaj legomoj.



Bildo 5. IJK flago naskiĝinta en Meksiko en 1981.

4. MEMBRARO

Dum 2010, kompare al 2009, malkreskis la membraro de 103 al 82 anoj Ni imagas ke tiu malkresko estas ĉefe pro la ne okazigo de nacia kongreso dum 2010, tamen ni ne certas kaj bedaŭras ke, malgraŭ la konstantaj bonaj rezultoj en la nacia movado, la kvanto da aktivaj membroj ne plialtiĝis aŭ almenaŭ restis stabila. Ni invitas varme la homojn, meksikanojn kaj eksterlandanojn, aliĝi al nia teamo, laborante kun ni, helpante per mono, disvastigante la lingvon!

Meksiko, la 12an de junio 2011.